All contributions to E.A.N.A. are deductible for income tax purposes.

PRAKTIKA UZO DE ESPERANTO

NENIU dubas pri la bono, kiun Esperanto farus, se ĝi estus universale uzata kaj instruata. Sed ofte oni havas la impreson, ke en la nuna tempo multaj membroj de nia movado ne uzas la lingvon sufiĉe kaj ke gravaj uzoj de Esperanto restas nekonataj al la ekstera mondo.

Se via fako estas elektrotekniko, medicino aŭ la fabrikado de mebloj, vi povas tiri realan profiton el via scio de Esperanto per intersanĝo de informoj kaj spertoj kun fakuloj en aliaj landoj. Se la rezulto de tia korespondado estas interesa, vi eble povos verki artikolon pri ĝi por iu faka gazeto. Artikolo bazita sur persona sperto ĝenerale estas tre alloga por redaktoro.

Se viaj spertoj ne estas sufiĉe gravaj por artikolo, vi almenaŭ povas menci ilin en letero al la redaktoro. La ŝancoj de publikigo estas bonaj, ĉar faka gazeto malofte ricevas tiom da leteroj kiom ĝenerala revuo. Kompreneble artikolo aŭ letero devas esti adaptata al la speciala karaktero de la gazeto. Instruisto skribu al instruista gazeto, inĝeniero al teknika, kuracisto al medicina, komercisto al komerca gazeto. Estas utile menci fakan literaturon kaj fakajn gazetojn jam ekzistantajn en la Interlingvo. Ne forgesu menci la adreson de EANA, atentigante, ke de ĝi petantoj ricevos senpagan informan materialon pri la lingvo.

Esperanto jam nun estas utila. Ĝi estus eĉ pli utila, se la Esperantistoj uzus ĉiun eblecon kaj konigus siajn spertojn al la ekstera mondo.

"BOLD THOUGHTS ON LIFE"

The above is the title of the new book referred to in our September-October number, by *Ernest G. Dodge*, who has often been mentioned in *AE* as Director of the Book Rental Service of *EANA*. Mr. Dodge is an old time loyal worker for Esperanto and *EANA*, and Esperanto receives a boost from two allusions in the new book. The fuller of these is in the Publisher's Introduction, where the last paragraph has this to say:

"Because of catholicity of interest in humanity as shipmates in a single boat, it is not strange that for a long time Mr. Dodge has been interested in Esperanto, that simplified international language whose aim is to bridge the chasm of language diversity which so often prevents intercommunication and appreciation between man and fellow-man. The Esperanto language periodicals in countries of North and South America and Europe have published many fugitive pieces from his pen, both originals and literary translations in prose and verse. And so it occurs that half a dozen of the shorter numbers out of *Bold Thoughts on Life* have already found their way (in substance though with different titles) to a select stratum of international readers through that language whose very name is based on the root word 'to hope'. And if there is any one word which may be called the keynote of the present volume, it is also the same word, *HOPE*."

If any of our readers shall feel inclined to place *Bold Thoughts on Life* upon their own book shelves, they may do so by sending \$3.50 to *Christopher Publishing House, 1140 Columbus Ave., Boston 20, Mass.*, or direct to the author at the following address: *Ernest G. Dodge, 1471 Irving St., N. W., Washington 10, D. C.*



LA MONTO KAMELDORSO

Nia samideano C.H. McKinney de Phoenix, Arizono, tradukis interesan legendon kiun ni presas sube. Ĝi estas pri monto nomata "Kameldorso" (Camelback). Vidu la bildon supre. La monto aspektas kiel surgenua kamelo. S-ro McKinney loĝas tre proksime al "Kameldorso".

ANTAŬLONGE, staris en nia valo la granda *Pordo de Oportuno*. De tempo al tempo tiu Pordo malfermiĝis, por ke homoj povu trapasi. Je la tempo de nia historio vivis tri amikoj – *Hatimo, Jafaro, kaj Ŝalimano*. Venis la tempo, kiam la Pordo malfermiĝos. La tri amikoj rapide kuris laŭ la karavana vojo. Apud la vojo sidis almozulo – liaj lambastonoj rompitaĵ, liaj manoj levitaj. Hatimo kaj Jafaro senkompatate preterpasis lin. Nur Ŝalimano montris kompaton kaj haltis por helpi la almozulon.

Pro tio, ke Ŝalimano haltis, li maltrafis la malfermiĝon de la Pordo. Kaj tiam malespero venis al Ŝalimano, sed la voĉo de la almozulo subite haltigis lian mizeregon. "Ĝis kiam vi bridos vian malpaciencon kaj bedaŭron, Ŝalimano, la Pordo de Oportuno ne valoros al vi." Konfuzite, Ŝalimano sin turnis al la almozulo, kaj tiu daŭrigis: "Tion, kion vi devos scii, vi povos lerni de via kamelo," kaj tuj la almozulo malaperis.

Sekvantan matenon, Ŝalimano iris por loĝi ĉe malgranda oazo, por atendi ĝis kiam la Pordo ree malfermiĝos. Dume la tempo pasis. Per la diligenta kaj pacienca helpo de sia kamelo, li kulturis la dezerton kaj ĝi produktis abunde kaj fariĝis loĝloko de ĝojo. Pensoj pri la Pordo de Oportuno malaperis de la menso de Ŝalimano.

Unu tagon, venis al la oazo Hatimo kaj Jafaro. Ŝalimano demandis pri la Pordo. "Ĝi estas trompo," diris Hatimo, "ĉar ĝi rekondukis min al la loko de kie mi venis." Diris Jafaro, "Ĝi kondukis min al malgranda oazo malproksime en la dezerto. Do, mi opinias, ke ni trapasis falsan Pordon. Sed, oni povas klare vidi, ke vi, Ŝalimano, trapasis la ĝustan Pordon."

Tiam Ŝalimano komprenis kion diris la almozulo. "Ĉu vi ne scias," li diris, "ke la Pordo de Oportuno ĉiam estas malfermita antaŭ vi? Oni ricevas sian oportunon nur per diligenteco kaj pacienco. Tion mia kamelo instruis al mi. Kaj mi nun preĝos al Alaho, ke li skulptu el solida ŝtono la figuron de mia kamelo, por ke tiu instruo povu daŭri kaj esti simbolo por ĉiu."

La jaroj pasis. Alaho sendis la pluvon kaj la ventpelatan sablon por skulpti por Ŝalimano kaj por ĉiu vojaĝanto la figuron de la surgenua kamelo. Kaj tiel longe kiel restos la persista kuraĝo kaj diligenteco de niaj pioniroj, tiel longe la Pordo de Oportuno estos malfermita antaŭ ni. Kiel ĉiaman ateston, ni montras al vi nian monton "Kameldorso."

INTER LA KLUBOJ EN USONO

Membroj de la Esperanto-Klubo de Lima, Ohio, jam delonge aliĝis 100 procente al EANA. Lastatempe, krom la kutimaj ok membrecoj, la klubo sendis tri novajn membrototizojn. La prezidanto de la grupo estas *D-rino L. K. Beecher*, al kiu ni ŝuldas grandegan dankon pro ŝia lojala partopreno en la Subtena Komitato de EANA de post ĝia komenco. Imitinda ekzemplo de persona kaj kluba subteno!

La Esperanto-Grupo en Newark, N. J., daŭrigas aktivan laboron. *Donald Walton* informis nin, ke la Lernejo por Plenkreskuloj en la Altlernejo Westside anoncas kurson de Esperanto por la nova semestro komence de Marto. *F-ino Elsie Junghans* aperigis "Leteron al la Redaktoro" pri Esperanto en la ĵurnalo *Newark Evening News*.

La Esperanto-Klubo MOSAMO, en la Kolegiopri Minoj kaj Metalurgio, Rolla, Missouri, lastatempe ensendis ses novajn membrecojn al EANA. *Profesoro John M. Brewer*, konsilanto de la klubo, skribis jene: "Laŭ nova regulo de la klubo, membreco en MOSAMO postulas ankaŭ membrecon en EANA. Mosamanoj venis al la konkludo, ke kluboj povas plej bone organizi kaj labori se ili donas plenan subtenon al EANA. Ni deziras, ke EANA havu la subtenon necesan por daŭre gvidi nian Esperantan agadon laŭ firmaj, amerikanaj vojoj."

Nova Esperanto-Klubo fondiĝis en la Sanigejo en Sanitarium, Calif. Prezidanto de la grupo estas *S-ro Milton E. Davis*, kaj sekretario estas *F-ino Laurene Allee Flanagan*.

Literatura kaj Praktika Esperanto-Grupo estas organizita en New York por studi internacian literaturon pere de Esperanto. Dum la unua kunveno en Decembro parolis Esperante reprezentantoj el multaj landoj: *Shinji Miyamoto* el Japanujo, *Luis Martnez-Ungria* el Argentino, *Thomas Kaŝiuba* el Litovujo, *Rubén Gotay-Montalvo* el Kubo, *Nicholas Costanza* el Trieste, *Myron Mychajliw* el Ukrainujo. En postaj tri kunvenoj prelegis *D-ro W. Solzbacher* pri la evoluo kaj signifo de la Esperanta literaturo; *Gesinjoroj Berthold Schmidt* pri germana literaturo; kaj denove *D-ro Solzbacher* pri la rusa literaturo, A.K. (t.e. antaŭ komunismo!).

Survoje returne al Japanujo, *S-ro Shinji Miyamoto* estis gasto de Esperanto-grupoj en Washington, D. C., San Francisco, kaj Los Angeles. La ĵurnalo *Los Angeles Times* intervjuis *S-ron Miyamoto* kaj *S-ron John E. Falk*, kiu tradukis de Esperanto al la angla lingvo dum la intervjuo.

Novaj Esperanto-studgrupoj en Lernejoj: *Leslie J. Corey* raportas pri fondo de nova Esperanto-grupo en la altlernejo de Cottage Grove, Ore. La lernejestro kaj la direktoro subtenas la novan agadon. En *Arlington, Virginia*, troviĝas Esperanto-studgrupo en la altlernejo Washington Lee. *F-ino F. Elizabeth Huls*, instruistino en la altlernejo gvidas la grupon. En *Lynn, Mass.*, instruisto *Robert Alberg* starigis novan klubon de Esperanto por siaj gelernantoj (13-jaraj) en la tiea lernejo.

Al kurs-gvidantoj: Viaj lernantoj havos pli grandan intereson por Esperanto se ili aliĝos al EANA. Petu informon pri favora student-kotizo.

HOMAJ KARIKATUROJ PER MANĜILAROJ

D-ro Lehman Wendell

ĈIU homo devas havi ĉefokupon, ĉar tio provizas al li panon kaj buteron; sed li ankaŭ bezonas flankokupon, ĉar sen ĝi lia pano baldaŭ fariĝos malfreŝa kaj lia butero ranca. Dum multaj jaroj mia flankokupo estis Esperanto, sed kiam mi fariĝis pli lerta en ĝia uzado mi havis pli da tempo por alia flankokupo – fotografado. Miaj fotoj jam estas aperintaj en pli ol 20 naciaj gazetoj, ankaŭ en kelkaj libroj. Lastatempe mi turnis mian atenton al la kreado de humoraj fotoj el diversaj manĝilaroj. Teleroj, tasoj, plad-oj, kremujoj, kaj tiel plu, se lerte kunmetitaj, fariĝas komikaj homaj kapoj.

Foto n-ro 1 montras du klaĉemajn virinojn, kiuj renkontas unu la alian en la korto. Sen-



saĝaj vortoj tuj elfluas kiel akvo el la sitelo. La maldekstra virino konsistas el taso, kovrilo de sukerujo, florujo. La okulvitroj estas tondilo kaj la hararo ŝtalo-lano. La dua virino estas kremujo sur deserto.



Foto n-ro 2 estas portreto de politikisto, kiu faras multajn promesojn antaŭ ol li estas elektita, sed kiu baldaŭ forgesas siajn belajn promesojn tuj kiam li sidas en sia nova, luksa oficejo. Li naskiĝis unu vesperon el kafujo, okulvitroj kaj kartona ĉapelrando.

Foto n-ro 3 montras virinon, kiu konstante havas vinagran mienon. Rideto neniam tuŝas ŝiajn lipojn, kaj ŝia konstanta admono estas: "Kio ajn estas amuza estas malbona." Ŝi naskiĝis dum malvarma, pluva vespero el taso, staranta sur renversita supujo. Ŝia kapo portas viŝtukan ĉapelon, kaj ŝi rigardas sian grizan mondon tra malgranda tondilo.



ESPERANTO-KRONIKO

Pri la 38a Japana Esperanto-Kongreso (23 Septembro 1951) skribis *W. P. Vathis* jene: "Ĉeestis la kongreson proksimume 200 personoj, venintaj el ĉiuj partoj de Japanujo. Krome partoprenis la kunvenojn du alilandanoj, la subskribinto kaj *S-ro A. C. Blatt*, ambaŭ Usonanoj. Ke ankaŭ en Japanujo oni povas fari spritajn ŝercojn, montriĝis kiam mi demandis bonhumoran kaj eminentan japanan samideanon, pri la motivo, kiu venigis lin al la kongreso, kaj li respondis 'lokomotivo'!"

En Kolegio "Pacific Union", Sanitarium, Kalifornio, *S-ro Milton Davis* faris prelegon pri Esperanto antaŭ la Lingva kaj Literatura Grupo. Ĉeestis 40 personoj, inter kiuj estis ĉiuj estroj de la lingvaj fakoj de la kolegio, kaj preskaŭ ĉiuj instruistoj de fremdaj kaj angla lingvoj.

"Vaganta filo de Esperanto revenas!" Tiel skribis *Jimmie R. Osburn*, kiam post longa silento li renovigis sian membrecon en EANA, kaj aldonis ekstran sumon laŭ la jena klarigo: "La restaĵo de ĉi tiu ĉeko estas prokrastita donaco, kiun produktis miaj abeloj. Mi bedaŭras raporti tamen, ke veneno en la kotonon en Arkansas, igis min ĉesi pri la abelbredado, kaj, do, nun mankas al EANA ĝiaj 16,000,000 abelmembroj!"

Ni bedaŭras raporti pri la subita morto de *S-ro Robert L. Davis* en la aĝo de 73 jaroj. *S-ro Davis* estis longtempa kaj fidela Esperantisto. Li mortis la 16an de Decembro en sia hejmo en Highland Park, Mich.

C. M. Worthington, eks-pastro, kiu servis multajn jarojn kiel misiisto en Malajo, informas nin, ke li nun diligente studas Esperanton. Samtempe li instruas la interlingvon al kelkaj knaboj 10-14 jaraj en sia hejmurbo, Jacksonville, Florido.

En la "Boston Traveler", ĵurnalisto *Neal O'Hara* skribis: "Esperanto la universala lingvo estas prave kreitaĵo de ruso, *D-ro L. Zamenhof* – sed oni neniam aŭdas la bandon en la Kremlo fanfaroni pri tio!"

George E. Wagner, antaŭe en Cleveland, Ohio, nun loĝante en Tampa, Florido, skribis ke kvar geknaboj komencis lerni Esperanton kun li.



F-ino Ann Eliza Beatty, mondfama membro de EANA havos 95 jarojn en Julio 1952. Ŝi estas loĝinta dum la tuta vivo sur bieno proksime al Cardington, Ohio. Tamen ŝi ofte faris vojaĝojn al Esperanto-kongresoj, kaj plue 'vojaĝis' tra la tuta mondo per Esperanto-korespondado. F-ino Beatty ĉiam estis tre aktiva en la movado. Ŝi tradukis 240 kantojn kaj himnojn (inter kiuj troviĝas 20 de ŝi mem), sub la titolo "*Espero Internacia*". Antaŭ nelonge ni ricevis gazeton el Brazilo kun artikolo pri ŝi. Kaj ĵus alvenis de ŝi la kutima kotizo al EANA – jen kiel Membro-Subtenanto kune kun donacabonoj al AE por du bibliotekoj. F-ino Beatty ĉiam estis tiel aktiva kaj lojala de post sia Esperantistiĝo kiam ŝi havis 50 jarojn. EANA, kaj Esperantistoj ĉie, salutas ŝin en la 95a jaro de ŝia vivo kaj dankas ŝin pro multe da efika laboro por nia movado.

KANADA INFORMO

S-ino O. Bervy, Kingston, Ontario, kies foto troviĝas dekstre, skribis 2-paĝan artikolon pri Esperanto en la gazeto *Food for Thought* de la Kanada Asocio por Eduko de Plenkreskuloj. S-ino Bervy, nun 84-jara, estis aktiva dum 40 jaroj pri eduko de plenkreskuloj en Rusujo. Depost ŝia alveno al Kanado ŝi skribis manuskripton "Historio de Edukado en Rusujo" je propono de la Amerika Konsilantaro de Klerigaj Societoj.



Toronto Esperanto-Klubo celebris la naskiĝtagon de D-ro Zamenhof per festeno kaj varia programo. Krom Kanadanoj, ĉeestis la kunvenon samideanoj el Anglujo, Polujo, Germanujo, Estoujo, Ĉekoslovakujo, kaj Skotlando.

Andrew O'Reilly, nia vojaĝanta soldato, raportas el Vancouver pri kunvenoj de la Esperanto-Klubo en tiu urbo. Je la naskiĝtago de D-ro Zamenhof la grupo estis gastoj de *Gesin'oroj W. Maier*, kiuj konis D-ron Zamenhof en Eŭropo. Japana samideano, *S-ro Sin-Iĉi Sato*, oficiro sur ŝarĝboato dufoje vizitis la grupon.

Miriam kaj Gustav Carlson, Vancouver, B. C., geedzaj Esperantistoj, sendis la kutiman duoblan kotizoh al EANA por pli bone subteni la Nord-Amerikan asocion kune kun la jena saluto: "Ni transdonas al vi nian sinceran dankon pro la pasinta jaro, kaj la sindona laboro kiun vi ĉiuj plenumis en kondukado de la EANA kaj la eldonado de la bonstila ĵurnalo. Al ni ĉiam estas ĝojo legi la enhavoriĉan gazeton AE."

FRUA AMERIKA PROJEKTO DE UNIVERSALA LINGVO

Unutage, dum mi ĉirkaŭrigardis sencele la longegajn bretojn de la Novjorka Publika Biblioteko, mi ekvidis malnovan volumeton, kies titolo altiris tuj mian atenton. Laŭ mia scio ĝi ne estas tute konata de Esperantistoj, kaj ĉar ĝi havis sian originon en Ameriko, mi opinias, ke ĉiuj gesamideanoj nepre interesiĝos pri ĉi tiu ektruvo. Jen ĝia titola paĝo: *A universal language, formed on philosophical and analogical principles, by James Ruggles. Cincinnati, printed by M'Calla and Davis, 1829.*

La universala lingvo-projekto inventita de S-ro Ruggles estas tre regula, sed ankaŭ malsimplega. La nombro de ĝiaj gramatikaj formoj estas almenaŭ tiel granda, kiel en la lingvoj plej fleksiataj, ekz. sanskrito; krom tio, por esti kiel eble konciza, la verkinto inventis specialajn sufiksojn, kiuj esprimas ĉiajn rilatojn, ekz. artikolojn, pronomojn, kaj eĉ relativajn frazojn en unu vorto. La verbo posedas ankoraŭ pli multe da formoj. Rimarkinde ankaŭ estas la uzado de la literoj *j, c, q, x, z*, por esprimi la sonojn *aj, ju, oj, aŭ, oŭ*. Jen mallonga ekzemplo de tiu lingvo:

"*Teljnszdxn bonpx skjnztxn kolpx skripztl lokzpurx varburs Telurp, naratoldui popzpurzr.*" (La geografio estas scienco, kiu donas priskribon de la diversaj lokoj sur la tero, kaj raporton pri ilia loĝantaro.)

— D-ro John L. Mish



DEZIRAS KORESPONDI



Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondukupono); Enlande, unu vorto por du cendoj.

Anglujo. S-ino R. M. Dhonau, 9 Cromer Road, *Sheringham* (Norfolk). Deziras korespondi per poŝtkartoj aŭ leteroj.

Israelo. Avri Salamon, P. O. B. 8, *Kiryat-Motzkin*. Honestege interŝanĝas stamp. kaj nestamp. PM kun ĉiuj landoj. Preferinde kompletajn seriojn.

Franco. S-ro Jules Prieur, 97 Avenue J. Jaures, *Aubervilliers* (Seine). Dez. kor. kun usonanoj pri vivmaniero, tradicioj, literaturo, ktp.

Japanujo. Inĝ. Tanaka Yayoi, Nakanihon, Kobe Zosensyo, Wadasaki, *Kobe*. Japana Interarkitekta Unio deziras kontakti kun arkitektoj kaj artistoj en la mondo. Respondo garantiata.

Aŭstrujo. F-ino Anni Petrej, Stiegeng. 5, *Graz* (Steierm.) 23-j., pri ĉio.

Hispanujo. A. Navarro Botella, Cl. Paradis No. 3, pral. 2a, *Barcelona*.

Hispanujo. Emilio Pérez, San Miguel 26, *Zaragoza*. 21-jara, il. PK.

Japanujo. Junuloj en tuberkulozaj sanigejoj deziras kor. Jenaj adresoj:

Takashi Sakai, Danhigashi, *Katsuyama*, Okayamaken. 24-j., pri ĉio.

Eiichi Akamatso, *Kakomura*, Kakogun (Hyōgo-ken). 26-j., pri geografio.

Tadashi Isobe, ĉe Gifu Nacia Sanigejo, *Ooi-cho*, Gifu-ken. Kvakeroj.

Akira Ide, Tenrjuso Futamataĉo, Sizuoka-ken. 22-j., pri historio, filmoj.

Germanujo. Johannes Schlüssen, *Hörnerkirchen über Elinsborn*.

Japanujo. Espo-Klubo en OTSU Altlernejo, *Feze Honmachi*, Sigaken.

Japanujo. Atusi Matubara, Nutuiti, *Ono-gun*, Oita-ken. Kun ĉiuj landoj.

Japanujo. Hisao Jamamoto, 3 Izumiĉo, *Niŝinomija-ŝi*, Hjogo-ken. Kemio.

Japanujo. M. Kinjo, 13 Mijamotodoori, *Fukiai, Kobe*. 20-j., pri belarto.

EANA & UEA MEMBERSHIP DUES FOR 1952

The Association thanks you sincerely for your support during 1951 and requests that you send your 1952 dues soon. An early remittance would be very helpful and would avoid the extra office work of sending out reminders.

All categories of EANA membership receive the *American Esperanto Magazine* and all *Bulletins*. Your EANA membership automatically gives you "Associate Membership" (AM) in the UEA. You receive the coupons of the UEA and have a right to the services of Delegates throughout the world.

In addition, there are "Individual Membership" categories in UEA: the *Yearbook* is supplied for an additional \$1.25 annually; the *Yearbook* and the magazine *Esperanto* (monthly) are supplied for an additional \$3.00 annually. Here are Membership Rates for 1952:

EANA membership including UEA	Associate of UEA	Yearbook of UEA	Yearbook & Esperanto
Subscribing member	\$3.00	\$4.25	\$6.00
Sustaining member	5.00	6.25	8.00
Patron member	10.00	11.25	13.00

POPULAR ESPERANTO BOOKS

The Central Office is equipped to supply all your book needs. Here are a few popular and standard items. 10% discount in quantity. Ask about other titles.

<i>PRACTICAL ESPERANTO</i> , Dr. Wm. Benson. Many use this text for class or self because it is unique with 650 pictures to illustrate rules, affixes, vocabulary, etc. Grammar in English, exercises in Esperanto. 160 pp. illustrated.....	\$.25
<i>REED'S PRACTICAL GRAMMAR</i> , Dr. Ivy K. Reed. A very complete beginner's text for class or self, with extensive examples, dialog, etc. Offset reprint, a few pages slightly blurred but fully usable. 142 pp. with vocabularies and a complete index. Original price 75¢, reduced to less than half-price.....	.35
<i>ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE</i> , Connor-Solzbacher-Kao. The new complete manual of Esperanto. "6-books-in-1": history, textbook, reader, world directory, 2 dictionaries. All in one vol. 245 pp.....	Paper \$1.50; Cloth 3.00
<i>UNIVERSALA ESPERANTO-METODO</i> , Dr. Benson. Encyclopedic all-Esperanto book of 11,000 pictures with textbook, reader, dictionary. 560 pp.....	Cloth 6.00
<i>ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY</i> , Cox. A detailed and thorough analysis of Esperanto grammar in English, innumerable examples. 371 pp.....	Cloth 1.50
<i>ESPERANTO (World Language Series)</i> , Prof. Mario A. Pei. Complete Esperanto chapter from "World's Chief Languages". Gram. survey, vocabularies, etc.....	.25
<i>WORLD'S CHIEF LANGUAGES</i> , Prof. Mario A. Pei. A guide and survey of languages of entire world, incl. Esperanto. Maps, glossary, index. 663 pp.....	Cloth 6.00
<i>AMERICAN POCKET DICTIONARY</i> , Karl Froding. Esp-Eng & Eng-Esp. Beginner's pocket companion. Offset edition in paper covers. 80 pp.....	.25
<i>EDINBURGH DICTIONARY</i> . Esp-Eng & Eng-Esp. Excellent and complete, in concise form. The very best small dictionary for English speakers. 288 pp.....	Cloth .85
<i>MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY</i> . Latest edition with 2nd, 3rd, 4th, 5th, & 6th "Aldonoj de la Lingva Komitato". Complete, 490 pp.....	Cloth 2.50
<i>FULCHER & LONG ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY</i> . Incl. proper names and neologisms. Each meaning listed separately. Complete, 348 pp.....	Cloth 2.35
<i>PLENA VORTARO DE ESPERANTO</i> , Grosjean-Maupin. Esp-Esp. The large complete all-Esperanto dictionary. Authoritative. 511 pp. Offset edition.....	Cloth 4.00
<i>Rare</i> , exactly same as above, but better paper & binding. Deluxe ed.....	Cloth 6.50
<i>FUNDAMENTA KRESTOMATIO</i> , Zamenhof & others. Authoritative chrestomathy and literary guide. Innumerable model stories, poems, etc. 472 pp.....	Paper 1.65
Latest edition, exactly same as above, but newly bound in boards.....	Half-Cloth 2.50
<i>KARLO</i> , Edmond Privat. Very popular easy first-reader, used in many classes. Life of Karlo as he grew from boyhood to young manhood and marriage. 43 pp...	.25
<i>THE BIBLE in Esperanto (Sankta Biblio)</i> . The best "Reader". Beautifully printed. Bound in blue, art vellum, 8vo, latest ed. on excel. Bible paper. 996 pp....	Cloth 2.50
<i>ESPERANTO SORTIMENTO</i> . Five books, good reading at low cost: <i>Akrobato de Nia Sinjorino</i> , legend of France, 25 pp; <i>Blanche-Virgolino de Lille</i> , medieval romance, 42 pp; <i>Lando de Arĝenta Akvo</i> , story of Far West, 48 pp; <i>Misĝerere</i> , music story, & <i>Thais</i> , by Anatole France (2 bks in 1), 66 pp; <i>Roĵuĵo Ĉumilĵara</i> , the miracle of love, 48 pp. Each book 25¢. Entire sortimento for only.....	1.00
<i>RARE COLLECTION OF 25 ESPERANTO KEYS</i> . Albana, Angla, Araba, Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Finna, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japana, Malaja, Norvega, Persa, Portugala, Romanĉa, Rusa, Slovaka, Sudafrika, Sveda. Contains several rare items. Most complete collection...	2.75
<i>INDIAN BEAD STAR</i> . Genuine "Kiowa" work, tiny Indian beads on fine buckskin, round white ground with green star, beautiful rare art piece, 1 1/4" dia., brooch..	1.00
<i>GREEN STAR PENDANT</i> . Round white ground with green star on both sides of pendant, nickel trim, eyelet & 1 link, for necklace or watch-chain, 1 1/16" dia...	.75
<i>ENAMEL GREEN STAR</i> . Round white ground, gold trim, 7/16", button or brooch..	.65
On pentagonal white ground, with an E, gold trim, 7/16" dia., button or brooch...	.65
On star-shape ground, with E, white edge, gold trim, 10/16", button or brooch....	.65
On round white ground, gold trim, 1/4" dia. (small), with 2" pin, tie-pin only.....	.65

Esperanto, 114 W.16 St., New York 11, N.Y.

NEW CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records
Instruction by Doris Tappan Connor

New! Modern! The "*Connor Course*" is unique, — it provides real-life disk conversations plus the personal instruction of *Doris Tappan Connor*. The one and only record course, in any language, that gives *everything* in the way of learning aids. *NOW*, you can learn Esperanto like a "native"—*better, quicker, and easier*. It's fun to learn this real-life way! You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. The "*Connor Course*" is compiled by experts. "*Vinylite*" recordings by Mr. and Mrs. Connor. All designed so you can *master* Esperanto.



The complete "*Connor Course*" includes the following:

- (1) A lively text, "*Esperanto: The World Interlanguage.*"
- (2) Eight complete "*Vinylite*" double-sided 10" records.
- (3) A practical and easy-to-follow "*Study Guide*" (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of *Mrs. Connor*.
- (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
- (7) And finally, an official "*Certificate of Achievement*".

FOR INDIVIDUAL STUDY: The complete "*Connor Course*", as described above, will be sent postpaid for only \$36.

FOR GROUP STUDY: Buy one complete *master course* at \$36. Each additional member pays *only \$6 more* for Textbook and complete *Study Guide* for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order *NOW*:

Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.